

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

## Enhavo:

- Dora Gabe — Peneva : Vespero, tr. A. Grigorov.  
Teodor Trajanov : Marŝo de l'barbaroj.  
Trifon Kunev : Pestulo. Vento blovas.  
Dimčo Debeljanov : Zorgo.  
Dimitr Panteleev : Arbhakisto, tr. Ivan Dobrev.  
At. D. Atanasov — Ada : La bogomilismo.  
Petro Stojan : Pri la evoluo de Esperanto.  
*Boris Denev* : Vespero (penraĵo); Pri la XII;  
Enlanda Esperanto-movado.









# BULGARA ESPERANTISTO

ABONPAGO :  
por Bulgario  
40 levoj,  
por alilando  
250 sv. fr.  
aŭ egalvaloro

MONATA ORGANO  
DE LA BULGARA ESPERANTISTA  
SOCIETO

Adreso  
de la Redakcio  
kaj administracio :  
Sofia (Bulgario),  
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj  
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

Dora Gabe — Peneva

## Vespero

Pli ol ĉion mi ŝatas, kiam la veturilo ekiras sur la monteto. Unue estas videbla sur la ĉielo la kapo de la ĉevalo, poste ĝia dorso, poste mia frato, kiu veturigas. Kaj kiam ni atingas la supron, tuj estas videbla la herbejo kaj la falĉistoj. Ili ne scias kion ni portas por ili. Ni ĝin ne diras, ili mem divenu.

Dio mia, kia estas mia fratinetto, kun ŝi oni nenian ludon povas aranĝi : ŝi ĝin anoncas al ili antaŭ ol ili ĝin divenis ! Ja tial mia frato ŝin batis hieraŭ, kaj hodiaŭ ŝi refoje rapidis diri : ŝi ne pripensas, ne atendas, sed tuj ĝin diras . . .

Nun la falĉistoj opinias nin la plej bonaj infanoj en la mondo, ĉar ni alportas al ili ĉiuvespere manĝaĵon. Nur la bonaj infanoj zorgas pri la aliaj. Kaj panjo estas la plej bona en la mondo.

La suno subiras kaj la vento estas for. Estas pli bone sen ĝi, ĉar ĝi siblas en la orelojn kaj oni ne povas kompreni kiam oni parolas. Kiam la suno foriras, ĝi ankaŭ foriĝas. La grenkampoj ne plu susuras, ĉar ili dormemas. Ankoraŭ estas hele, kaj ili jam dormemas.

— Pro kio estas hele ?

— Kiel pro kio !

— Ĉu ne ja la suno subiris ?

— La tago ne volas foriri.

— Kaj se ĝi ne foriĝos ?


— Nun tuj venos la nokto kaj ĝin pelos for.

Vere, ĝi ĉiuvespere venas kaj forpelas la tagon.

Pli ol ĉion mi ŝatas kiam la griloj kantas. Tiam oni plenigas la veturilon per fojno kaj kun ni venas la granda falĉisto. Nun la aliaj falĉistoj diris „ĝis revido“ kaj nin akompanis ĝis la vojo. La vojo ne estas videbla, ĉar la mallumo rampas sure kaj la grenkampoj ne ĝin allasas.

La fojno odoras je timiano kaj je floroj. La falĉistoj tranĉis for la florojn — ili jam formortis, nur iliaj animoj restis kaj





Boris Denev:

Vespero.

plenigis la tutan mondon kaj nun la mondo odoras bone. Tial la griloj kantas kvazaŭ ebriaj.

— Kiel peze spiras la ĉevalo! Mia frato staras rekte. Li la tuta estas videbla sur la ĉielo. Lia kapo estas pli granda, liaj manoj pli longaj...

La mallumo ĉirkaŭbrakis la veturilon, ankaŭ nin ĝi ĉirkaŭbrakis, ankaŭ la grilojn, ankaŭ la grenkampojn, ankaŭ tutan la mondon ĝi ĉirkaŭbrakis! Kiel bona estas la tuta mondo! Pli ol ĉion mi ĝin amas!

Mia fratineto endormiĝis. Ni kien iras? La grenkampoj spiras dormante kaj la vojo eniras ilin.

— Ĉu tio estas la nokto?

— La nokto.

— Kiel varma, kiel bona ĝi estas. Samkiel panjo...

La ĉevalo peze spiras kaj ne estas videble kien la veturilo iras. Ĝi nur dronas, dronas...

— Kien ni iras!

— Ja hejmen!

— Ah, vere!

Ja la ĉevalo konas la vojon! Kaj kiam estas plej mallume, ĝi tamen trovas ĝin, ĉar la ĉevalo estas nia. Ankaŭ la vojo estas nia, ankaŭ la grenkampoj estas niaj, ankaŭ ĉio estas nia.

— Ĉu ne ĉio estas nia!

— Ĉio.

— Kiom mi amas ĉion!

Trad. A. Grigorov

---

Abonu al „Bulgara Esperantisto“!

---



## Bulgaraj poetoj

Teodor Trajanov

## MARŜO DE L'BARBAROJ

Ni staras en minaco,  
 kun la espero stranga,  
 ni — nigra legion'!  
 Ekbrulis jam malpaco,  
 batal' ektondris sanga  
 kontraŭ centjara tron'!

Potencaj, okulfajraj,  
 kun unu koro frata  
 ni marŝos al batal —  
 parolon dum centjaroj  
 humile ne diratan  
 eldiros ni per ŝtal',!

Kaj himnon de ribeloj  
 tra l'tuta mondo vasta  
 trumpetos demonar —  
 ekflamos la ĉielo  
 por mondbatalo lasta  
 kontraŭ la tiranar!

Stariĵu, ĉiuj sklavo,  
 lepruloj haŭtotiaj,  
 kun fajro el infer —  
 kaj filojn kaj la glavojn  
 tremante benos via  
 Patrino — nigra ter!

Kun permeso trad. Skito.

Trifon Kunev

## PESTULO

Nu, verdadu hoj, kamparo vasta,  
 Spikfleksadu hoj, grenkamp' orpaĵa!

Tra l'kamparo polva voj' serpentas,  
 sur la vojo homo sola ĝemas —  
 akcidento la fremdulon trafis,  
 en fremdlando — loko nekonata,  
 lin malsano kaptis nekristana.  
 Suno ŝutas fajron sur la teron,  
 al junulo lipojn ĝi bruligas.



Hirundetoj suden ekalflugas,  
 de l'fremdulo la okuloj larmas —  
 amajn vortojn ame li parolas:  
 „Jen vi estas, birdoj vi facilaj,  
 nu alflugu al vilaĝo mia,  
 de la patro vastajn kortojn trovu,  
 kaj vizitu paĉjon la kadukan,  
 karan panjon, amon malfeliĉan  
 kaj anstataŭ mi al ili diru,  
 ne atendu ili, ne esperu . . .  
 amatino tuj amaton serĉu,  
 ĉar mi ankaŭ geedziĝon faros  
 kun svatantoj — lupoj sangavidaj,  
 rabobirdoj — ar' da svatantinoj . . .“  
 — Nub' malluma brilan sunon kaŝis,  
 turnovent' funelojn polvajn levis,  
 tondro skuis nubojn mallumegajn,  
 ektorentis granda pluv' kampare.  
 Apudvoje dormas nekonato  
 kaj ĉielon fikse rigarcadas . . .

Nu verdadu, ho', kamparo vasta,  
 plenigadu spikon, gren' orpajla!

### VENTO BLOVAS . . .

Vento blovas,  
 arb' foliojn movas.  
 Junpaŝtist' per  
 miel' ŝalmo ludas,  
 surde ludas  
 foren kanto flugas —  
 Junpaŝtisto  
 Venton alparolas:  
 „Vento, forta vento, estu frato,  
 nu, tuj prenu mian dolĉan kanton,  
 ĝin transportu trans arbaroj, valoĵ,  
 ĝin al mia amatin' alportu,  
 amatino grenon nun rikoltas,  
 oran grenon, fajran sun-tritikon,  
 nu, al ŝi senbrue iru, diru,  
 sed mallaŭte, vento, en orelo,  
 ke meznokte ŝi al mi esperu,  
 min atendu en la ĝardeneto . . .“  
 Vento blovas,  
 orajn spikojn movas,  
 Junpaŝtist' per  
 mielŝalmo ludas . . .



Dimčo Debeljanov

## ZORGO

Vekiĝas mi — tra vitroj tago okulumas,  
 el dolĉasonĝa nokt' forflugis lasta sign'.  
 Nun kio min atendas? Venko? Fal' malluma?  
 Ne scias mi, sed vi, ĉu ne, atendas min.

Kun frunt' al ter', sur sojlo staras vi je gard,  
 hararo griziĝanta dise ondofalas,  
 lumeto maltrankvila brilas en rigard.  
 Eliras mi — kaj post mi paŝas vi mortpala.

Mi frue velkigita spiron vian sentas  
 dum ĉiu ekleviĝ', dum ĉiu nigra fal';  
 post kiu ĝojo ja ne trickis mi da gal'

kaj kiom da diaĵoj mortis senlamente,  
 en korangul' restinta virga en la viv',  
 ho Zorgo, mia kunulin' sur voj-dekliv'.

D. Panteleev

## ARBHAKISTO

Arbar, kaj tra l'arbar' silente  
 sonĝpaŝas arbhakistoj grandaj  
 kun haroj grizaj kaj velkantaj —  
 fleksitaj trunkoj de la vento.

Kaj lasta mi, haj lasta mi — ilia  
 malluma, nekonata filo  
 post ili kuras, saltas, krias,  
 surbrakiginte la hakilon.

Auuuu . . . ekmuĝas nigraŭtuno,  
 auuuu . . . sin ĵetis la platanoj,  
 kaj tra l'arbar' ekportis sin maljuna  
 furia vent' — miljara blindtitano.

Kaj ŝajne de la mondo-kreo  
 min ekpelinta estas pluv' kaj vento,  
 kaj nur meznokto savas de l'pereo —  
 kabano min renkontas kun lamento.

Renkontas min pri forta dorm sonĝante,  
 kaj ĵen atendas mi la dian nokton,  
 ke lacon en okulojn surverŝante  
 ĝi tuj faligu min surteren morta.

Trad. Ivan Dobrev



At. D. Atanasov — Ada

## La Bogomilismo

(2)

Se ni farus supraĵan paralelon inter Bulgario en la mezepoko — de la IX ĝis la XIV jarcentoj — kaj la okcidenteŭropaj landoj, ni tuj konstatos, ke tiam Bulgario staris multe pli alte ol ili en kultura rilato. En la okcidentaj landoj estis ebla nenia spirita vivo, esprimata per nacilingva, komprenebla al la popolamasoj literaturo. Oni ne permesis traduki la Biblion en nacian lingvon. Ĝi estis nekonebla afero por la popoloj. Dume en Bulgario estas tradukataj la libroj de la Biblio, la Evangelio, la diservaj libroj, kaj ekfloras literaturo en nacia lingvo. En la preĝejoj oni faras la meson en bulgara lingvo, komprenata de la popolo — kio en la katolika mondo signifus revolucio en tiu epoko!

Bulgario, akceptante la bizantian kulturon, ne heleniĝis. Ĝi montris grandan nacian rezistecon kaj en sian lingvon ĝi komencis transigi la bizantian literaturon. Ĝi fariĝis perilo, transportanto de la bizantia kulturo, reflektilo de la lumo, kiu eliris el tiu civilizacia centro, al la ceteraj slavaj landoj. La lastaj, kaj same ankaŭ Rumanio, prenis de Bulgario la alfabeton, la unuajn librojn, kaj ricevis de ĝi ankaŭ la unuajn instruistojn kaj predikantojn.

Nun ni provu restarigi antaŭ niaj okuloj la internan socian vivon de tiu ĉi ŝtato; ni prezentu la bildon de tiu vivo en la tiama Bulgario.

Sur la plej alta ŝtupo de la socia ŝtuparo sidis la reĝo — „reganto super ĉiuj bulgaroj kaj grekoj“ (titolo, imitanta tiun de la bizantiaj imperiestroj) — ĉirkaŭita de bizantia kortega lukso, postulanta, kiel la bizantiaj imperiestroj, ke oni donu al li honoron kaj adoron kvazaŭ al Dio. Li aspiradis al absoluta potenco, tamen en tiu ĉi celado lin baris la tendencoj de la nobelaro — la boljaroj — kiuj venas post li en la socio. La nobelaro estis tre forta kaj aspiradis limigi la reĝan povon, por ke ĝi havu la potencon. Estis grandaj kaj malgrandaj nobeloj. Ĉiuj posedis regionojn, en kiuj ili regis kun absoluta rajto, kiel monarĥoj. La malgrandaj boljaroj vivis konstante en siaj posedaĵoj, la grandaj vivis precipe en la ĉefurbo, ĉirkaŭ la reĝo, kaj de tie ili estris siajn bienojn. Kiam la reĝa trono restis vakanta, la boljaroj elektis en granda kunveno reĝon. Ofte iuj nekontentaj boljaroj apartiĝis en siaj regionoj kaj regis, ne rekonante plu la potencon de la reĝo. En la 13<sup>a</sup>—14<sup>a</sup> jarcentoj la boljararo jam tre fortiĝis, limigis la potencon de la reĝo; la ŝtataj demandoj estas jam proponataj por diskuto kaj solvo en la boljara konsilantaro, sub la prezido de la reĝo.

Vice kun la nobela klaso grandan influon en la politika kaj socia vivo de la regno havis ankaŭ la pastraro. Ĝi ankaŭ konsistis el grandaj kaj malgrandaj pastroj, laŭ la okupata rango. La altranga pastraro rilatis kun la reĝo kaj ludis saman rolon kiel la grandaj boljaroj. Ofte la patriarko partoprenis en la ŝtata



konsilantaro. La monaĥejoj posedis, kiel la boljaroj, siajn regionojn, en kiuj la vilaĝoj kune kun la loĝantoj apartenis al ili.

Estis ankaŭ burĝa, urbana klaso, la loĝantoj de la urboj, kiuj diferencis de la vilaĝana amaso per tio, ke ili ne apartenis al iu boljaro kiel posedaĵo, ne estis firmigitaj al iu peco da tero — do, estis liberaj. Ili estis plejparte komercistoj kaj metiistoj. Tiu ĉi klaso estis malforta kaj ne havis ian signifon por la ŝtataj aferoj. Nur, en la 14. jarcento, kiam ĉe reĝo loano Aleksandro estis veninta deputacio el iu bizantia partio por peti lian kunagon kontraŭ la reganta tiarn en Konstantinopolo imperiestro, la tirnova urbanaro en la stratoj per krioj petis la reĝon, ke li ne komencu militon; sed la matureco de tiu klaso tiam estis nur tia: havi dezirojn, provi esprimi ilin, sed ne ankaŭ trudi ilin.

Kaj nun, kontraŭ la viditaj klasoj, ni prezentu al ni tiun grandegan vilaĝanan amason, dissemitan sur ebenaĵoj kaj en montoj, kie ankaŭ hodiaŭ estas aŭdata bulgara popolo. Tiu ĉi amaso, dividita en regionoj, vivis sub la senpera rego de la feŭda nobelo — la boljaro. La pli granda parto el ĝi estis en feŭda stato, algluita al sia peco da tero, ne havanta rajton memvole forlasi ĝin, en plena posedo de sia boljaro. Sed la vilaĝano havis unu privilegion, kompare al siaj similuloj en la okcidentaj landoj de la sama epoko: la boljaro povis vendi aŭ donaci iun familion nur kune kun ĝia terpeco, li ne povis deŝiri la homojn de la tero. Nur por puno pro malobeo al ordono la boljaroj havis rajton igi iun plena sklavo, vendi lin arbitre, sen la tero laborata kaj heredita de li. La vilaĝanoj laboris la pecon da tero, kiu apartenis al la familio; la pli granda parto de la produktoj estis prenata de la boljaro, kiu siaflanke apartigis procenton el la ricevitaĵo por la reĝa trezorejo. Pro tio ofte por la produktantoj mem produktoj ne restis en sufiĉa kvanto, kaj en iuj periodoj la popolo vivis en granda mizero.

En la ŝtataj aferoj, kompreneble, tiu ĉi amaso ne partoprenis. Kiam okazis milito, la boljaro kolektis inter siaj subuloj la necesan kvanton da militistoj, kiun li devis prezenti en la reĝa armeo, kaj kondukis ilin al milito.

Oni ne prizorgis instrui kaj klerigi tiun ĉi amason. Ordinare la pastroj, kiel la boljaroj, prenadis kiom ili povis, el la produktoj de ĝia laborado, por sekurigi sian senzorgan vivadon, sed pri la spirita stato de tiu popolo ili tute ne ekpensis. Ili faris la ceremonian diservon regule, kaj per tio ilia misiista tasko elĉerpiĝis. Kompreneble, tio donis pli malfrue eblon al la herezaj instruantoj tre facile penetri en la popolan amason kaj ekposedi ĝin. En sia traktaĵo kontraŭ la bogomilanoj presbitero Kosma klare montras tiun staton, indignas kontraŭ la inerteco de la pastroj kaj boljaroj, kaj akre riproĉas la riĉajn boljarojn, ke ili amasigas en siaj palacoj librojn, sed ties enhavon ili ne konigas al la popolo, kaj lasas ĝin en malklereco — bona grundo por la herezuloj; li komparas tian boljaron kun malzorgema ŝafisto, kiu prenas de sia ŝafaro la lanon kaj la lakton, sed malzorgas pri ĝia bonstato.



La popola maso restis kun siaj idolanaj kredoj, vestitaj nur per kristana mantelo. La malnovaj dioj ŝanĝis nur siajn nomojn per tiuj de la kristanaj sanktuloj: la dio de la tondro akceptis nomon Sankta Ilio, la dio de la fruktodono — Sankta Georgo ktp. La evangeliaj rakontoj miksiĝis kun tiuj de la slava mitologio, kaj tiu ĉi kulto regas ankoraŭ nun en nia popolo, en ĝiaj kredoj kaj ritaj kutimoj. Ankoraŭ nun oni adoras la nimfojn, kaj havas specialajn festojn destinitajn por ili, oni havas festojn, dediĉitajn al la lupoj, al la musoj k. c. — dum kiuj la popolo nun ankaŭ ne laboras, por ne provoki la koleron de tiuj bestoj-dioj.

La popola maso ne konis sian reĝon; ĝi nur aŭskultis pri li, kvazaŭ pri malproksima, neatingebla altrangulo. La vilaĝanoj povis vidi sian reĝon nur kiam li venis en iliajn regionojn por ĉasi. Li estis ĉirkaŭita, kompreneble, de granda sekvantaro da korteganoj. Ili fortrenis ĉiujn produktojn el la vilaĝaj domoj, la kokinojn, la ovojn, la buteron ktp. — kompreneble, tute senpage, por nutri la majeston kaj liajn homojn. Tiuj ĉi vilaĝanoj, kiuj spertis la gastan viziton de la reĝo, certe ne havis belajn rememorojn pri li.

La reĝo, ofte donacis al boljaroj aŭ precipe al la monaĥejoj, tutajn vilaĝojn aŭ apartajn familiojn. En la *K r i z o b u l o* (orstampita letero), per kiu reĝo Ioan Ŝiŝman donacas bienojn al la Rila monaĥejo (kiu dokumento estas konservata nun en la biblioteko de la monaĥejo) ni legas interalie: „vilaĝo Gradeĉnica kun ĝiaj loĝantoj laŭnome: popo Tudor kun liaj infanoj kaj lia paren caro, kaj Petr Teodosov kun liaj fratoj“ ktp.

Mi jam diris, ke la pastroj tute ne zorgis por la popolo, sed nur pri sia bonvivo, kaj pro tio la eklezio ne havis aŭtoritaton antaŭ la popola maso. La moroj de la pastraro estis korumpitaj kaj presbitero Kosma kun indigno vivas ĝin en sia traktaĵo. La malgrandaj (malaltgradaj) pastroj ne distingiĝis per klereco. Ofte ili ne konis la religion pli bone ol siaj parokanoj.

La kadenco en la moralo de la eklezio en tiu epoko estas ĝenerala en la tuta kristana mondo. Tio estis la kriza momento, kiam oni devis kompari kaj pritaksi la principojn de la Krista instruo kun la aktuala stato de la organizita oficiala eklezio. La kristanismo jam fariĝis oficiala religio, ĝin akceptis reĝoj, kaj ĝi devis trovi vojon por paciĝi kun ili kaj por konformiĝi al la vivo, kiun Kristo plej malrekonis kaj kondamnis. Je lia nomo komercisto estis nun benata de la pastro, kiam li komencis sian profesion. Je lia nomo la pastroj benis la armilojn de la soldatoj, kiam la lastaj ekiris al milito. La idealeco de la kristanismo perdiĝis. El religio de la malriĉuloj, de la prematoj, ĝi fariĝis religio de la potenculoj, de la premantoj. Oni elektis el la tuta instruo nur kelkajn sensignifajn dogmojn, oni forgesis la veran evangelion, sed komencis doni pli grandan signifon al la diversaj decidoj de la ekleziaj kongresoj, la decidoj de la sanktaj patroj. Sur tiu vojo de la kormpeco ekiris ankaŭ la pastraro. Ĝi celis bonan, kontentigan vivon, abundecon, ĝi do deziris vivi en kon-

la grandaj boljaroj. Ofte la patriarko partoprenis en la stato



kordo kun la potenculoj, kiuj garantiis al ĝi tiun vivon, kaj ĝi kulturis la religion en tiu senco. Pro tio, al la potencohavantoj kaj al la pastroj estis tre oportune. El la idea, persekutita iam, movado, restis unu ŝelo, unu luksa kovrilo, kaj el interne oni forpelis la sencon kaj la esencon.

La kristanismo devis antaŭ ĉio reformi la socian vivon — tian signifon havas la instruado de Kristo, en tiu spirito la unuaj kristanoj formis siajn komunumojn. Nun pri tio oni tute ne parolis — ĝi estis danĝera por la ŝtato. La kristanismo fariĝis religio, fremda al la vivo.

Kaj jen, de kiam la kristanismo ekiris sur tiu vojo, aperis nature la malkontentuloj, kiuj kontraŭbatalis la ŝelon, por venigi denove la region de la esenco. Tiuj estas la herezuloj. La herezoj do estas la natura retroakcio al la deflankiĝo de la kristanismo.

Homoj, kiuj serĉis en la religio ekkoni la veron kaj la esencon en la ekzisto, la sencon de la vivo, ne povis kontentiĝi per la eksteraj ceremonioj de la diservo, nek en la seka dogmaro de la pastra prediko. Rigardante al la korumpita kaj malĉasta vivado de la ekleziuloj, ili komencis malestimi ilin; la eklezio kaj la eklezia religio perdis ĉiun prestiĝon por tiuj homoj. Tiam ili ekserĉis la respondon al la demandoj, kiuj tuŝis ilin tiel profunde, en la evangelio mem, en la vivo kaj en la diroj de Jesuo, — ili sin turnis al la „vera kristanismo“, kiel diras ĉiuj herezuloj. Sed ili vidis, ke multaj pozicioj de Kristo estas identaj kun la pozicioj de pli malnovaj ol li pensuloj: Sokrato, Plato, iuj ideoj en la orientaj religiaj instruoj, kiel tiuj de Zaratustro, Kabalato k. a.

Kelkaj filozofoj en la orientaj landoj kreis el tiuj elementoj la filozofian sistemon, konata sub la nomo „gnostikismo“ (el la greka vorto γνῶσις — scii, latine *cognosco*), kio signifas proksimume „sciantismo“. La nomo mem montras la esencon de tiu nova formo de la kristanismo: religio, en kiu ĉio estas konforma al la racio kaj al la scienco. La gnostikismo tamen estas abstrakta filozofio, kaj la simplaj masoj de la diversaj popoloj ne povis asimili tian nutraĵon. Pro tio aperis multaj instruantoj, kiuj donis popularan esprimon de tiuj ideoj, ofte rerakontante naive ilin, vestante ilin en la formojn de fabeloj, ofte eĉ tute ŝanĝante la sencon de iu pli abstrakta penso, kiun ili mem ne povis kompreni. Aperis la herezo de Ario, aperis la batalado kontraŭ la adoro al la ikonoj, aperis multaj aliaj herezoj — mesalianismo, maniĥe-anismo, paŭlanismo k. a. — ĉiuj parencaj inter si en la fundamento, kaj diferencaj en kelkaj detaloj. Iuj el ili donis pli grandan atenton al la sociaj demandoj, aliaj al la religiaj-dogmaj. Aperis predikantoj, kiuj ekiris en la diversajn popolojn por disvastigi la herezojn. Parolante pri tio, ni ne devas forgesi, en kia epoko okazis tio. Kompreneble, tia propagando de hereza instruado tute ne povis esti organizita en maniero, kiel nun: mankis tiam la presarto, mankis la rapidaj komunikoj, mankis ebleco prepari klerajn predikantojn. Ofte la predikantoj tute naive konceptis la herezon, predikis ĝin laŭ sia kompreno, modifis ĉion laŭ la popola



gusto, kaj la herezo vojaĝis en tia formo, ke ĝia klera fondinto mem ne povus plu ĝin ekkoni.

Ofte oni, parolante pri herezuloj, miksis iliajn nomojn, ne diferencigis paŭlanojn de maniĥeanoj aŭ de aliaj anoj.

Tiun ĉi staton de la aferoj ni devas nepre havi en konsidero, parolante pri la penetro de la herezoj en la popoloj en tiu epoko.

La ĉefaj demandoj, al kiuj serĉis kaj proponis respondon ĉiu hereza instruo, en religia kaj filozofia rilato, estis: kiel estas kreita la mondo kaj la homo; kia estas la rolo de Dio en tiu kreo, kaj kia — la rolo de la Malbono; ĉu la Malbono estas io memstara, aŭ estas subigita al Dio; kia estas la rilato inter korpo kaj animo; kia estas la rilato inter homo kaj Dio.

Post la respondo al tiuj demandoj ĉiu faris por si la konkludojn pri la senco de la vivo kaj pri la praktika aplikado de la ricevitaj konoj en sia privata vivo.

La gnostikismo instruas, ke la malbono en la mondo ne estas kreita de Dio, nek estas veninta post Li, sed estas same eterna — senkomenca kaj senfina — kiel Li. Dio estas la eterna spirito, kontraŭ kiu staras la same eterna materio. Dio kontraŭbatalas la malbonon; se li kreis ĝin, ĉu li kontraŭbatalus sian kreaĵon? — Tia religia kredo estas konata sub la nomo „dualismo“, t. e. kredo pri du komencoj de la vivo, du apartaj kreantaj fortoj en la mondo.

Estas du specoj de dualismo en la religio: absoluta, kiu rekonas la du fortojn — Dion kaj la malbonon — egale eternaj, kaj kies batalo ĉiam daŭros, kaj modera, kiu predikas, ke la malbona forto aperis pli malfrue, estas malpli forta kaj en la batalo estos iam venkita.

La gnostikismo akceptas la absolutan dualismon.

Laŭ la instruo de la gnostikistoj, homo konsistas el tri elementoj: spirito, animo kaj korpo. Konforme al la intelekta alteco de aparta individuo, ĉe la lasta dominas iu el tiuj elementoj super la du restantaj. Ĉe iliaj adeptoj dominas la spirito (greke πνεῦμα), ĉe la ordinaraj ortodoksaj kristanoj — la animo (ψυχή), — kian cetere havas ankaŭ la bestoj, sed ne sufiĉe evoluinta, — kaj fine, ĉe la idolanoj — la korpo (σῶμα) ombrigas la du ceterajn elementojn.

Por la gnostikistoj ĉio materia estas kreaĵo de la malbona forto, ĉio spirita — de la bona.

Kiel mi jam diris, la gnostikismo nutris multajn herezojn, kiuj disvastiĝis inter la popoloj en tiu epoko: maniĥeismo, paŭlanismo, mesalianismo k. c., kaj kiuj per populara maniero disvastigis tiujn ideojn pri la kreo de la vivo.

Mia celo ne estas, fari nun kurson de herezologio, kaj pro tio mi ne haltos kaj ne parolos detale pri la diversaj herezoj. Mi nur notos kelkajn iliajn karakteraĵojn.

La kredo, ke la materio estas verko de la malbona forto en la mondo, igis la adeptojn de multaj herezoj malestimi la



materian flankon de la vivo kaj ekerni al asketa vivado. Multaj herezaj sistemoj predikas, ke oni devas malestimi kaj malzorgi la korpon, por savi la spiriton, kaj starigas la internan, „nematieran“ (ne per lipoj, lango, vortoj), la „adorigardan“ preĝon, la fastadon en atendo, ke ilia spirito unuiĝu kun Dio en unu momento de plena korpa senforteco. Konsekvence al tiuj ideoj ili malestimis la vivon de tiuj, kiuj celas krei oportunecon por la korpo, kaj precipe la luksan vivon de la reĝoj, boljaroj kaj pastroj. La evito de ĉia tera oportuneco por savi la animon — tio ja estas la bazo ideo ankaŭ de la oficiala monaĥismo.

Multaj herezoj aspiris revenigi la socian vivon al la formo komunuma de la unuaj jarcentoj post Kristo.

Laŭ la herezoj, la homo estas savita, kiam li jam perfektigis spirite. Tion li povas atingi per senĉesa preĝado kaj pensado pri Dio. Sed, kiam li atingis tiun perfektecon, li ne bezonas la zorgojn de speciala eklezio, kaj la preĝejo do estas superflua.

La plimulto el la herezoj konsideras la rakontojn pri la mirakloj de Kristo kiel alegoriojn, ne kiel faktojn. El la Sanktaj Libroj ili rekonis la evangelion, kaj ne la malnovan testamenton; iuj herezoj ne rekonis eĉ ĉiujn partojn de la evangelio; aliaj rekonas el la malnova testamento la psalmaron.

La herezoj multe vastiĝis inter la popoloj en la Bizantia imperio kaj de tie, samtempe kun la kristanismo oficiala, ili penetris en Bulgarion. Tie ĉi la herezpredikantoj trovis bonegan grundon en la malklera popola maso, soifanta, ke oni klarigu al ĝi la viv-solvajn demandojn, kiuj restis neklarigitaj de la religio.

La senaŭtoritata eklezio tute ne povis bari la disvastiĝon de tiuj herezaj movadoj. Baldaŭ la herezoj infektis eĉ boljarajn rondojn, penetris en iujn monaĥejojn, oni rakontas eĉ, ke ili penetris en la reĝan palacon mem, ke Samuilo, ekzemple, estis ne nur favora al la bogomilismo, sed ke li mem sekrete estis ĝia adepto. Tio certe estas legendo, sed ĝi tamen estas simptoma por la tiama tempo: se oni povis paroli, ke eĉ la reĝo estas herezulo, oni povus konkludi, kiom devas esti disvastigitaj la herezoj. En iuj antikvaj dokumentoj estas skribite, ke ekzistis tutaj regionoj en Macedonio, kie eĉ ne unu ortodoksa kristano estis trovebla, sed la tuta loĝantaro estis herezula. Pri la Vidina distrikto oni same atestas. Aperis vagantaj monaĥoj, elpelitaj el la monaĥejoj, kiuj iradis inter la popolo kaj klarigadis al ĝi la sekretojn kaj misterojn de la vivo laŭ la novaj instruoj. Iufoje tiuj ĉi propagandistoj estis tro kuraĝaj: dum la reĝado de loano Aleksandro, en la 14. jarcento, en Tirnovon venis el Saloniko la herezaj predikantoj Lazaro kaj Kirilo Bosota kaj predikis al la urbanaro (iuj konsideras ilin propagandistoj de la bogomilismo). Lazaro marŝadis tute nuda tra la stratoj; per tio li kolektadis la amasojn kaj predikis al ili. Kaj, tio okazis en la tronurbo mem!

La popolo enlogiĝis ankaŭ post tiaj ekstremaj formoj de la herezoj, kian prezentas la adamismo, t. e. celado vivi kiel Adamo kaj Evo, nude. La adeptoj de tiu ĉi movado, nomataj



„adamidoj“, kolektiĝis en amasoj — viroj, virinoj kaj eĉ infanoj, iradis en la montojn kaj tie en kavernoj kaj sovaĝaj lokoj senvestiĝis, kaj preĝadis al Dio nudaj. Laŭ iuj ekleziaj verkistoj en tiuj kunvenoj de la adamidoj regis granda malĉasteco.

Ĉiuj herezoj, disvastigitaj en Bulgario, baldaŭ eknutris novan herezan movadon, ekĝermintan jam sur nia grundo, en kiu la socia elemento aperas aparte forta kaj respondas al la demokratia karaktero de la bulgara popolo.

En la 10-a jarcento, dum la regado de reĝo Petro (la filo de Simeono) naskiĝis la herezo de popolo Bogomilo. Ion detalan pri la persono de tiu ĉi popolo ni tute ne scias. Estas nur legendoj de pli novaj tempoj sen historia valoro. Iuj kredas, ke Bogomil estas la sama persono, kiu aliloke estas nomata popolo Jeremia. Efektive multaj antikvaj verkoj mencias la nomon de la tre populara herezvastiganto popolo Jeremia. Aliaj supozas, ke Jeremia estas kunaganto kaj disĉiplo de popolo Bogomil. Kiel mi diris, pri la persono de popolo Bogomil ni nenion povas ekscii precize, ni nur konas lin per lia instruo.

Jen kion rakontas presbitero Kosma en sia verko, kiun mi jam citis:

„Kaj tiel okazis, en la bulgara lando dum la jaroj de la pravreligia reĝo Petro estis popolo kun nomo Bogomil\*), sed laŭvere Bogunemil (ne amata de Dio), kiu komencis unue instrui la herezon en la bulgara lando“.

Sendube, la Bogomilismo ne povas esti tute aparta kaj memstara de la ceteraj herezoj, vastigitaj en la lando kaj en la najbaraj popoloj. Precipe en sia religia flanko. Plena originaleco en la sociaj fenomenoj neniam ekzistas. Ĉio estas influata, ĉio estas ligita kun la aliaj fenomenoj. Tion, kio ordinare apartigas, diferencigas novan movadon de la similaj al ĝi movadoj, ni serĉos en tiu sigelo, kiun la nova ideologo metos al ĝi. La bogomilismo, teksita el fremda materio, ricevis efektive de sia fondinto sigelon tre karakteran — tio estas la forta socia flanko, la popoleco kaj demokratieco de la nova ideo.

Antaŭ ol elmeti la instruon de la bogomilanoj, mi devos fari unu noton, kiu estas tre grava, sed kiun tre ofte la esplorantoj de la bogomilismo ignoras. La bogomilismo vivis kiel movado en Bulgario dum kvar jarcentoj. Ĝi estis vaste popularigita ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj. Kvarcent jaroj ne estas mallonga periodo! En ĝi unu movado ne povas ne evolui, ne povas resti ĉiam la sama, kiel en sia komenco, ne ŝanĝi iujn poziciojn, ne plidetaliĝi iujn flankojn, ne solvi en diversaj epokoj ĉe diversaj cirkonstancoj diverse iujn problemojn, kiuj aperis antaŭ ĝi. La vivo, la evoluo de la ideoj movadoj donas al ni abundajn

\*) Etimologie B o g o m i l signifas D i - a m a t o.



ekzemplojn pri tio. Mi elmontros la instruon de la bogomilismo, ĝiajn rilatojn al diversaj faktoj, ĝiajn poziciojn, sed mi devas diri, ke oni ne povas aserti, kiu pozicio al kiu epoko apartenas, ĉu ĝi estis konservita ĝis la fino aŭ ŝanĝita post ioma tempo. Ofte oni povos vidi malkonsekvencon inter iuj faktoj en la Bogomila movado. Tio estas klarigebla nome per la evoluo, sed tie ĉi la scienco disponas plej malsufiĉan materialon kaj ne povas sekvi la bogomilismen en ĝia evoluado, en ĝiaj apartaj etapoj.

Mi do prezentos la bogomilan instruon kiom kaj kiel ĝi estas konata de la ĝis nun havataj dokumentoj,

Mi komencos per la religi-filozofia flanko. La bogomilismo, same kiel ĉiu alia herezo, penas doni respondon al la demandoj pri la esenco de la vivo, ĝia apero, la rilato inter la bono kaj malbono, inter la krea elemento kaj la detrua elemento en la mondo, inter la homo kaj Dio.

La bogomilismo akceptas la dualismon. Unue dominis la absoluta dualismo, poste iom post iom komencis domini la modera. En la 13. kaj 14. jarcentoj ĉe la bogomilanoj en Bulgario jam estas akceptata la modera, dum ĉe tiuj en Bizancio — la absoluta.

La kritikanto de la bogomilismo, presbitero Kosma, rimarkas tian ĉi duoblecon en iliaj konceptoj kaj diras: „ne kuntenas sin iliaj paroloj en unueco, sed disiĝas kiel putrinta ŝtofo“. Li diras, ke „ili nomas la diablon kreinto de la homo kaj de ĉiuj diaj kreaĵoj“, kaj ankaŭ nomas lin „perfidinta anĝelo, malhonesta domgardinto“.

(Sekvos)

## Pri la evoluo de Esperanto\*)

— — — Vere vivantaj en E. estas tiuj vortoj, kiuj enhavas la elementojn kunmetitajn, ekz. arbaro, plenumi, aliĝi, ... Sed en nuna prepara periodo ni devas toleri ankaŭ la mortajn vortojn, kiuj plaĉas al la nunaj eŭropaj scienculoj: hidroterapio akvokuraco, teologio scienco, politeisto multediano, agrikulturo terkulturo, aerolito aeroŝtono, biblioteko librarejo, ... Kiel por la domo konstruata necesas la helpa trabaro, kiu poste estos forigata, same estas utilaj tiuj mortintajoj, kiuj estonte mem malaperos, kun la disvolvo de E., sed kiujn nun ni devas toleri.

Multaj formoj kaj kunmetaĵoj de la primitiva E. nun ne estas uzataj, ili fariĝis „akraismoj“. Oni ne bedaŭru tion. Ĉar la akraismoj ne devas malaperi el nia lingvo, ili restu kun pli alta rolo, nome kiel materialo por la alta stilo, la solena lingvaĵo. La grandaj kulturaj lingvoj, kun malnova kulturo, posedas kapablon esprimi

\*) El la prelegoj de P. Stojan en la somera Universitato dum la 17. Kongreso Esperantista. La jenan fragmenton ni represas el „La Progreso“, Septembro, 1925.



ne nur ĉiutagaĵojn aŭ teknikajn aferojn, ankaŭ la altajn ideojn en supera stilo. Tiaj estas la ĉina, la rusa, la franca, la angla, ktp. Kiam E. havos sufiĉe da akraismoj, tiam ĝi akiros materialon por la alta stilo, kaj nur tiam ĝi fariĝis vere kultura lingvo.

Ne en kabinetoj de gramatistoj kaj ne en vortaroj kreiĝas nia lingvo. Ĝin kreas la vivanta popolo per la buŝa uzado en la kongresoj, kunvenoj, vojaĵoj, societoj kaj parolantaĵoj. Antaŭ la milito mi partoprenis en studenta rondo ĉe la Universitato en Petrogrado. Ni estis 30—40 fervoruloj por kiuj E. fariĝis kvazaŭ hejma lingvo. Ni ofte eraris, sed ankaŭ nature formiĝis novaj vortoj por la bezonoj de la ĉiutaga uzado. Multaj el ni uzis vorton iŝi (anst. ili pri virinoj, fraŭlinoj) eĉ ne suspektante ke tiu vorto ne estas oficiala. Ni diris kino anst. kinematografo, kaj foto anst. fotografajo. En alia parolanta rondo, en Bukureŝto, oni forte laboris por kaj en E., kaj tute nature unu kamarado demandis al la alia, anst. „kioma horo estas?“ — tute simple „kiomas kamarado?“, respondadis en la sama stilo: „kvaras“ aŭ „okas“! Enuigitaj centfoje ripetadi „ĝis la revido“, „ĝis la revido“, . . . oni komencis mallongigi: „Ĝis la! Bontagon! Jam tempo foriri! Espo“ kma estis la mallongajoj. En la sama urbo Bukureŝto estis unu strangulo, nekomprenebla tipo. Oni lin nomis „kvankamulo“, kaj tiu vorto absurda senseca, nekomprenebla — tre trafe signifis tiun homon, kies ĉefa trajto estis ĵuste la nekomprenebleco. En tiaj laborejoj kreiĝas la nova Esperanto pli fleksebla, natura, vivanta. Nia lingvo ne estas ia muzeo por konservi pie ĉiujn malnovaĵojn, sed la vivanta organismo kiu daŭre kreskas. La instinkto de l'fortoŝparo, ekonomio, puŝas ĉiujn lingvojn al la mallongigo. El latina paraveredus fariĝis germana Pferd, kaj el hellena parabole — parole. Ĝenevaj gimnastikistoj sin nomas „les gyms“, kaj ni — instruitaj homoj hontu antaŭ tiuj laboristoj, kiuj ne perdis la freŝan lingvan instinkton. Estos vera progreso por E. se venkos mallongaj formoj: gimnasto, mekanisto, koopa, kino, foto, aŭto, . . . El la pezaj formoj kun -a cio, -iko, -atoro volas elflugi puraj radikoj, kiuj suferas en sia jugligiteco, ni ne malhelpu al ilia liberiĝo. E. Pprivat uzis restorejo kaj ambasado, ni jam akceptas inaŭguri, ilumini, dekori . . . en tio kuŝas vera progreso.

Instinkto de l'simetrio kaj de reguleco estas universala. Araneo faras siajn retojn geometrie regulaj. Abelo konstruas siajn ĉelojn laŭ simetria kaj preciza modelo. Eĉ guto akva, ŝvebanta en la aero kiam ĝi pro la frostigo mortas, glaciĝas, ĝi en la lasta elspiro subite disfloras en la belan sespintan steleton, la neĝeron. Zamenhof estis abelo-homo kiu obeis al la sama instinkto, kaj kun ardanta fevoro konstruis la simetrian tabelon da kunrilatovortoj.

Petro Stojan

---

Abonigu al „Bulgara Esperantisto“!

---



## Pri la XII

La 12. kongreso de la bulgaraj esperantistoj estas nova venko de nia movado.

Krom la ekstera signifo je vidpunkto propaganda, ĝi havas ankaŭ signifon grandan kiel interna manifestaĵo de la unueca uzebleco de la lingvo, kaj ankaŭ kiel manifestaĵo de la evoluo de nia movado en la kadroj de Esperanto (praktikado de la lingvo). En tiu senco kultura akiraĵo la kongreso nepre estas.

En Ruse jam oni parolis nur en Esperanto. Nature, influis la cirkonstanco, ke ĉeestis alilandaj samideanoj.

Mi timis, ke la ĉi-jara kongreso ne tiom atentos pri la lingva flanko. Feliĉe tiu lasta ne estis ignorita, eĉ male — Sofia ne estis superita de Ruse.

La diskutado nur en Esperanto dum niaj kongresoj, konferencoj, eĉ grupaj kunvenoj kaj kunsidoj devas laŭeble fariĝi praktiko kaj tradicio. La du lastaj kongresoj de Bulg. Esp. Soc. devas servi kiel ekzemplo por la tuta lando.

Pri la laboro de la kongreso raportis ĝiaj protokoloj. Organizaj demandoj diskutigis kaj solvigis, novaj vojoj kaj metodoj de paca batalado estis desegnitaj, nova kuraĝo estis ĉerpita por la kultura laboro. Ankaŭ tio pligravigas la internan sukceson de la kongreso.

Inter la ekstera publiko la kongreso elvokis viglan intereson kaj simpatian por nia lingvo. Oficialaj reprezentantoj de ŝtato, komunumo, komercaj ĉambroj, ĵurnalaro, kultursocietoj kaj unuiĝoj (fervojistaj, muzikistaj, abstinula k. m. a.) salutis la kongresanojn, promesante pluan daŭran helpon kaj akceion por la fina venko de Esperanto.

Estis akcentita la grava signifo de la unuopa propagando en ĉiu kampo de la privata vivo. Ĉiu esperantisto devas fariĝi malgranda verda fajrujo, elradianta ĉiumomente la bonfarajn radiojn de nia ideo kaj lingvo. Oni esperantigu la edzinon, la geinfanojn, la gefratojn, la geparencojn, la geamikojn. Oni ne ĉesu boradi eĉ la graniton, oni semu eĉ sur la grundo supraĵe ŝtonhava. Oni uzu ĉiam novajn kaj novajn armilojn. Beninda estas tiu laboro, des pli dolĉaj ĝiaj fruktoj. A.

## Enlanda esperanto-movado

— La Centra Komitato de B. E. S. konstituiĝis jene: Georgi Aktarĝiev — prezidanto, Zah. Zahariev — vicprezidanto, Panajot Kolev — sekretario-kasisto, Asen Grigorov — bibliotekisto kaj Krum Mlaĝov, K. Kirkov, St. Orozov — membroj-konsilantoj.

— Sofia. Dum Oktobro en daŭro de kvin tagoj la sofiaj esperantistoj estis feliĉaj havi en sia mezo la japanan samideanon Teizo Ezaki. Lia estado en la ĉefurbo de la lando havis grandan propagandan signifon, des pli ke li vizitis kelkajn instituciojn kaj organizaĵojn.



a kulturkleriga vivo de la Centra Sekcio estas tre intensa: regule estas legataj referaĵoj diverstemaj en bulgara lingvo kaj en esperanto.

Estas malfermitaj kursoj de la Centra Sekcio, Poduena Sekcio, Lernanta Societo, baldaŭ malfermata de la Turista Sporta Esp.-Societo.

— Plovdiv. Vigla agado. La urbo estas jam efektiva centro de la esp.-movado en la tuta regiono.

— Panagjuriŝte. Per unuigitaj fortoj la lernanta grupo „Mezmonta Stelo“ ekagadis inter la lernantaro.

— Samokov. Ankaŭ en tiu urbo la movado senteble vigliĝis.

— Sviŝtov. Bone vizitata kurso en la Komerca Lernejo.

— Teteven. Estas renovigita la grupo „Verda Stelo“.

— Jambol. Tre granda intereso. Bone vizitata trimonata kurso.

— Karnobat. Malgraŭ tio, ke nuntempe ne estas grupo, la intereso estas pli ol notinda. La propaganda eldonajo de la Societo „Есперанто“ havas pleje da abonantoj en tiu negranda urbo.

— T.-Pazarĝik. La loka esp. grupo senlace agadas.

— Lukovit. La tiea grupo „Interkompreno“ ankaŭ ne restas malantaŭe. Speciala kurso por la lernantoj de la Pedagogia kaj Tehnika lernejoj.

— Radomir. La lern. grupo „Fajrero“ certe estas tiu, kiu povas esti ekzemplo pro sia sistema senlaca laboro kaj disciplino.

— Ŝumen. Iomete ne kiel antaŭe agema, ŝajnas ke lastatempe la loka grupo havas la ambicion reokupi sian lokon en la unua vico.

— Rahovo. Fondita nova grupo „L. L. Zamenhof“, kiu aperigas grandan energion.

— Kazanlik. Laŭ ĉio estas videble, kaj la tiea grupo havas laŭdindan ambicion verdigi la rozurbon.

— Burgas. Precipe notinda estas la agemo de la lernanta grupo. Komencitaj apartaj kursoj por lernantoj kaj lernantinoj.

— G.-Orehovica. Renovigita, la grupo „Espero“ inde plenumadas sian devon.

En granda nombro da vilaĝoj la movado ne cedas al tiu en la urboj. Nepre notinde estas, ke la kursoj estas plejparte vizitataj de la lokaj instruistoj. Ne estas preterlasebla la sindona agado de niaj samideanoj en la vilaĝoj Sadovec, Brest, Osmar, Teliŝ, Batiŝnica, Pravec, la vilaĝoj en la valo Ĉepino, Kilifarevo, Straĵica, Gramada kaj multaj aliaj.

Dankendan utilon por la propagando alportas la orkestro ĉe la Societo de la Bulgaraj Blinduloj, kiu seninterrompe vizitadas diversajn urbojn kaj vilaĝojn. La orkestranoj estas esperantistoj.

---

Redakcia Komitato:

Asen Grigorov — Zahari Zahariev



---

---

## ANONCOJ

estas pagataj 2 bulgaraj levoj por □ cm.

---

## TAŬGA LEGAĴO!

MIA AMIKO, legaĵoj de Zamenhof, Uhland, Kabe, Ramstedt, Rabindranat Tagore, Abdul Baha, Gogol, Selma Lagerlöf, Bourlet, Turgenev k. a. (necesega libro por ĉiu kursano) . . . . .	12.50
GUTO POST GUTO, originalaj versaĵoj el esp. poezio: de Zamenhof, Hankel, Privat, Simeonov, Deŝkin, Schulhof, Nekrasov, Kriss, Voleviĉ, Kühne, k. a. . . . .	15.—
L. L. Zamenhof: LA DEVENO DE ESPERANTO kun „Historieto de lingvo internacia“ . . . . .	10.—
Anton Ĉeĥov: RAKONTOJ, el rusa orig. trad. Hitrov . . . . .	15.—
Jack London: ĤINAGO, rakonto, kun aŭtora permeso el angla trad. P. Kay. . . . .	12.50
Lev Tolstoj: DIO UNU POR ĈIUJ, rakonto trad. el rusa lingvo . . . . .	5.—
V. Garŝin: SIGNALO, rakonto trad. el rusa lingvo . . . . .	10.—
K. Balmont: BLANKA SIGNO, poemo, tradukis N. Nekrasov . . . . .	10.—
Kuprin: LAŬROJ, fabelo, traduko el rusa . . . . .	2.50
Хитровъ: ПЪЛЕНЪ УЧЕБНИКЪ по Есперанто, граматика, упражнения, хрестоматия и два (еспер.-български и бълг.-есперантски) речника . . . . .	20.—
АРОР, новата международна стенография безъ надебелявания, изучаема въ 3—4 часа . . . . .	10.—

La prezoj estas en levoj. Liveras post antaŭpago

— ST. HITROV — Sofia —

Bul. Makedonia, 20.

---

---



Austria Esperantisto

Howengasse 12-2-13, Kornenburg,

Austrio

bei Wien